# Kuba prezidento elstarigas progresojn en vakcinado kontra? Kovim-19




**Foto: @ACN_Cmg**

Havano, sep 29 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, reliefigis la progreson kaj kvaliton de la vakcina procezo kontra? Kovim-19 de la infana lo?antaro en la kariba nacio.

En sia Tviter-konto, Díaz-Canel atentigis, ke ?irka? 1,6 milionoj da kubaj infanoj kaj adoleskantoj jam ricevis sian unuan dozon de Soberana02, 900,000 el ili havas inter 2 kaj 11 jaroj."
La prezidento emfazis, ke tio okazis en 25 tagoj, kaj neniaj gravaj adversaj eventoj estis raportitaj.

"En Kubo oni faras historion," emfazis la prezidento en sia socia reto.

Lastatempe, D-ro Vicente Vérez Bencomo, direktoro de la Finlay-Vakcina Instituto, klarigis, ke konjugitaj kontra?-Kovim-19-imunogenoj kiel Soberana 02 kaj Soberana Plus ?iam estis desegnitaj por la infanoj de la kariba nacio.

La spertulo atentigis, ke ?i tiu teknologia platformo konfirmis sian pruvitan efikecon en aliaj injekteblaj vakcinoj, tial la sekureco de la apliko de ?i tiuj drogoj ?e infanoj sub 19 jaroj.
Kubo fari?is la unua lando, kiu faris amasan vakcinan kampanjon en la infana lo?antaro tutmonde.

Aliflanke, specialistoj konsentis la anta?an tagon, ke la konduto de la pandemio sur la insulo en la venontaj semajnoj tendencos al kontrolo, kiel rezulto de la vakcina procezo disvolvita kun naciaj imunogenoj kaj aliaj faktoroj.

Fonto: Prensa Latina

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/271971-kuba-prezidento-elstarigas-progresojn-en-vakcinado-kontrau-kovim-19

RADIO HABANA CUBA

Radio Habana Cuba